



PENSEO

N-ro 180

okt./2006

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Karmemore al W. Auld

Shi Chengtai



William Auld, majstro
de la Esp-literaturo

Matene mi eklegis retleterojn de Mao Zifu kaj Guozhu en mia komputilo, ili informis, ke W. Auld forpasis je la 11-a de septembro, 2006, kaj ĝuste tiam eksonoris la telefono, mia amiko Guozhu parolis refoje pri la sama informo al mi, eĉ demandis, ĉu vi ne deziras skribi ion pri W. Auld, kiu korespondis kun vi longatempe kaj multe helpis vin? Jes! Mi certe volas. Ĉi-momente, kion fari mi povas, krom ke skribas ion por esprimi mian koran funebbron?

La dato de 9.11 ja estas terura por homoj sur nia mondo: antaŭ 5 jaroj en tiu ĉi tago du ĉielskrapantoj en Novjorko, Usono, falis sub la atako de teroristoj, tio ja estas tragedio. Ho, la sama dato ankaŭ estas trista por Esperantujo, ĉar en ĉi tiu tago de 2006, la granda poeto en Esp-o W. Auld forpasis.

Sidante antaŭ skribtablo, mi pensas, pri kio mi skribas? Oni diris, ke “por paroli pri Homero necesus esti alia Homero”, W. Auld ja estas granda stelo sur la esperanta poezia ĉielo. Kiam oni preparis celebri la centjaran jubileon de Esperanto (1987), dum la UK de 1983 en Antverpeno la eldonanto Briĉjo Kasini de Italio deziris iniciati la eldonadon de beletra serio, pri tio li konsultis kun alia poeto en Esp-o Aldo de Giorgi, kiu entuziasme akceptis la taskon de la redaktado. Sed “kun kaj per kiu aŭtoro starti? Eĉ ne demandinde, jen li, ...nia

famkonata, admirata kaj kara amiko Vilĉjo Auld!”¹⁾

Mi ne estas alia Homero, tial mi ne kapablas taksu la fruktorigan atingon en la esp-a kulturo, precipe en beletra verkado, de W. Auld, tamen mi neniam forviŝas la intiman figuron de W. Auld en mia menso, por mi li estas gigantulo, sed ankaŭ estimata instruisto, vojevandinto al la verda Parnaso kaj kara amiko! Mi desur lia granda ŝultro eniras la esperantan beletran ĝardenon.

Kvankam ekde 1958 mi fariĝis esperantisto, tamen mi ne trovis ŝancon por praktiki la karan lingvon Esp-on longatempe, ĉar tiam la socia vivo en nia lando Ĉinio estis severa, mi eĉ ne povis legi alilandan revuon en Esp-o krom tiu El Popola Ĉinio eldonita en Pekino, precipe dum la Granda Proleta Kultura Revolucio (1966-1976) la lernado de fremdlingvo ankaŭ fariĝis ia “krimo” de kontraŭleĝaj rilatoj kun fremdlandoj. Tiam mi nur ofte trafolumis kelkajn numerojn de El Popola Ĉinio, en la koro restas la aspirado al la monda harmonio.

Post la faligo de la Kvarpersona Bando la ĉina popolo gajnis la liberigon, mi denove bruligis la aman fajron al Esp-o en la koro, kaj aŭdace komencis korespondi kun fremdlandaj samideanoj, dank’ al la internacia korespondado mi povis legi periodaĵojn kaj eĉ beletrajn librojn eldonitajn en fremdlandoj, inter kiuj troviĝis la valora volumo Esperanta Antologio (1958, Stafeto) kompilita de W. Auld, kiun donacis al mi la svisa s-ano Max Kubler. Mi mem eĉ prove versis en Esp-o, dume ankaŭ pli multe legis la ĉinajn klasikajn literatutajn verkojn, kiuj estis malpermesitaj

kiel la venenaj herboj de la feŭdisma kaj la kapitalisma kulturoj dum la Kultura Revolucio. La praktiko de la lingvo Esperanto ebligis, do, mi aŭdace kontribuis por la revuoj Heroldo de Esperanto kaj Monato.

Kelkaj numeroj de Fonto, la beletra revuo en Esperanto, fariĝis mia kara legaĵo komence de la 80aj jaroj de la lasta jarcento. Kiam mi esperantigis poemojn de Li He (790-816), mia prefera poeto de Tang-dinastio, mi sendis mian malmaturan tradukon al W. Auld en la malproksima Skotlando, kiu redaktis tiun revuon, kaj petis, ke li kontrolu mian tradukon kaj donu revizian proponon, tamen W. Auld eĉ tolereme aperigis mian tradukon en Fonto, tio grande instigis min, tiel mi kontribuis plu por Fonto per tradukoj de la ĉinaj famaj poetoj, ekz. Zhu Ziqing, Zong Baihua k.a., mi debutis en la esperanta beletra revuo, de leganto de Fonto feliĉe fariĝis ties aŭtoro.

Ĉar mi petis al W. Auld, ke li kontrolu mian tradukon por perfektigi mian lingvan kapablon, baldaŭ mi ricevis leteron de alia poeto Kris Long el Anglolo, li volis fari tian laboron, tiel Kris Long multe helpis min kaj fariĝas mia intima amiko, eĉ por la sama amo al Du Fu (712-770), la granda poeto en la ĉina historio, Kris Long kunlaboris kun mi, ankaŭ elĉinigis poemojn de Du Fu, li fariĝas unu el tradukintoj de Poemoj de Du Fu, kiun mi poste kompilis.

W. Auld ankoraŭ estis redaktoro de la rubriko Novelo en la magazino en Esp-o Monato, sur kiu aperis noveloj de elstaraj esp-aj aŭtoroj, kiujn mi preferas legi. Konsiderante, ke la ĉina verkisto Cicio Mar (Ye Junjian) eldonis novelaron en Esp-o Forgesitaj Homoj en 1938, poste, ŝajnas al mi, neniun ĉinan esp-iston publikigis originalan novelon en Esp-o, mia mano sentis tiklon, do, mi aŭdace provis verki novelojn en Esp-o, kiujn mi sendis al W. Auld kaj petis lin, se mia provaĵoj ne atingas nivelon de aperigo en Monato, do, li forĵetu ilin en rubujon. Tamen

W. Auld refoje esprimis sian toleremon, aperigis miajn verkojn, eĉ preferis tiun pecon La Apostoliĝa Kiso, kiu estis kompilita en la novelaron Tempo Fuĝas (1995, FEL) proponite de li, kiam Flandra Esperanto-Ligo eldonis tiun novelaron por celebri sian 15an jubileon de Monato, selektinte 25 novelojn el tiuj, kiuj aperis en Monato de 1980 ĝis 1994.

Li Bai (701-762) estas la ĉina granda poeto, nomata Feo de Poezio en Ĉinio, Kalocsay iam esperantigis 7 pecojn el poemoj de Li Bai, kiuj aperis en la revuo Literatura Mondo, poste S. J. Zee ankaŭ esperantigis liajn poemojn. Guozhu, unu el elĉinigintoj de Li Bai, proponis al mi, ke kompilu Poemojn de Li Bai en Esp-o, mi ĝoje akceptis la taskon. Somere de 1989 mi vizitis Japanion, invitite de s-ano Osioka Moritaka, iama sekretario de Japana Esp-Instituto, mi prelegis nome de Li Bai en Esperanto en la salono de JEI, Tokio. Kiam mi revenos landen, la japana verkisto en Esp-o s-ano Hayasi Ken donacis al mi la kompletan da kara revuo La Nica Literatura Revuo, redaktite de G. Waringhien, entute 42 numeroj, en iu numero mi legis la tradukon de 11 poemoj de Li Bai esperantigitaj de W. Auld, tre ĝoje mi skribis leteron al li, en kiu mi petis, ke li verku antaŭparolon por la libro Poemoj de Li Bai en Esp-o, kaj por gajni lian permeson, ke mi metos la tradukon de W. Auld en la poemaron.

W. Auld entuziasme respondis min, baldaŭ li verkis antaŭparolon por la poemaro. Eĉ pli li skribis al mi, se mi ne povus trovi eldonanton por tiu poemaro en nia lando, do, sendos la manuskriptojn al li, kaj li provos eldonan eblecon en la Okcidento. La manuskriptoj kuŝis en mia tirkesto longatempe, poste mi sendis la manuskriptojn al li. Dum UK li kontaktis kun s-ano Huĝimoto Tacuo, komitatano de Japana Esp-Instituto pri tio, Huĝimoto, de la manoj de W. Auld prenante la manuskriptojn, revenis al Oriento. Dank'al la klopodado de W. Auld Poemoj de Li Bai

eldoniĝis en Japanio 1995.

En 1990 pere de subtenado de la ĉinaj samideanoj Guozhu, Even kaj Lin Liyuan mi redaktis povran beletran revueton en Esp-o Penseo, tia laboro dekomence gajnis la instigon de W. Auld. Li kontribuis kelkfoje por Penseo, malgraŭ ke tiu revueto ĉiunumere nur estis falde 4 paĝoj de 16K, kaj en korespondo donis al mi efikan proponon. Lia subtenado grande instigis min, la revueto Penseo daŭris dek jarojn sub mia redaktado. Kiam la 50a numero de revueto aperis, W. Auld skribis leteron al mi, ke li jam bindas la kompletan da 50 numeroj de Penseo, tio ja faligis min kaj Guozhu en delicon!

W. Auld redaktis kelkajn revuojn en Esp-o, unu el liaj grandaj kontribuoj por Esp-movado kaj la esperanta kulturo estas laŭ mi, ke li bakis ne malmulte da verkintoj kaj verkantoj en Esp-o. Mao Zifu, poeto en Esp-o de nia lando havis similan karieron al mi. W. Auld unue rimarkis lian talenton sur paĝoj de Penseo, poste li donace sendis al Mao Zifu kelkajn beletraĵojn, publikigis la faskon da poemoj originale verkitaj de Mao Zifu per la tuta paĝo de la rubriko Poezio en Monato, aŭguste, 1994. Nun Mao Zifu ankoraŭ diligente “fosas sulkon” en la verda Parnaso.

Post la emeritiĝo de W. Auld nia korespondado, laŭ lia parolo, fariĝis inter esperantistoj, sed ne inter redaktoro kaj aŭtoro. Liaj intimaj leteroj donis al mi multe da instruoj kaj ĝojo, varmigis mian koron. En 1989 W. Auld vizitis sian filinon en Hongkong, li veturis al Pekino, tie li estis varme akceptite de laborantoj de Ĉina Esp-Ligo. Li esprimis al akceptanto, ke li deziras renkonti min, la akceptanto de ĈEL diris, ke Shi Chengtai loĝas norde fore de Pekino je du mil km, kaj li nur restis en Pekino du tagojn, tial ne informis min. Reveninte hejmen, W. Auld skribis al mi leteron por esprimi bedaŭron, jes, ankaŭ mi bedaŭras, eĉ eterne bedaŭras nun...

Ĉar li fine forpasis de nia mondo.

Kiam poetino Hilda Dresen (1896-1981) mortis en Tallino, Estonio, W. Auld emociie verkis nekrologon, li verkis: “kie ni trovos ŝian anstataŭanton?” li mem respondis: “Ni ne trovos; tiaj homoj estas unikaj.”²⁾ Do, nun mi elmetas la saman demandon: Ĉu ni povos trovi lian anstataŭanton? Eble la respondo estas la sama. Tamen ni, vivantaj samideanoj, almenaŭ povas ĝuadi liajn beletrajn verkojn kaj lerni ion de lia talenta kontribuado por Esp-movado, kaj senlaca klopodado por la esperanta kulturo, tia klopodado kaj liaj verkoj faras la monumenton en la koroj de ĉiuj esperantistoj!

1) el En Barko Senpilota, p. 14, Edistudio, 1987

2) el Pajleroj Kaj Stoploj, p.50, UEA, 1997



2006-09-13, Daqing, Ĉinio

Ĉinesko

Zhuang Qixiong



—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

I

Granda,granda
animo, ĉiam branda ?
Ridegu en krizo
ne pro sen ĉemizo !
Zomi,zomi,
ĝis ĉiel' aromi !

II

Moka moka

